



ESPERANTO KAJ SPELEOLOGIO

KAEST

Modra – Harmónia

18. – 21. 11. 2010

© Ján Vajs



ESPERANTO KAJ SPELEOLOGIO

Enhavo de la prelego:

1. Konataj rilatoj inter S kaj E
 1. 1. en la mondo
 1. 2. en Slovakio

2. Speleologia fakgrupo
 2. 1. Speleotendaroj
 2. 2. Agado de E-speleologoj
 2. 3. Vesperto
 2. 4. Membrobazo

4. Speleologia fakvortaro

5. Diskuto



ESPERANTO KAJ SPELEOLOGIO

Bazaj speleologiaj difinoj

- Speleologio
- Speleologo
- Karsto
- Groto






ESPERANTO KAJ SPELEOLOGIO

Speleologio

– estas termino kiu oni kreis el grekaj vortoj *spélaion* (groto) + *logos* (scienco).

La terminon enkondukis franca karsta esploristo Edouard A. Martel (1859 – 1938) por scienco, kiu interesiĝas pri studo de karsto, ĉefe de grotoj. Esperantistoj-speleologoj uzas jenan difinon: *speleologio estas homa aktiveco, kiu okupiĝas pri grotaj kaj karstaj fenomenoj.*





ESPERANTO KAJ SPELEOLOGIO

Speleologo

– *estas homo, kiu okupiĝas pri speleologio.*

Larĝa difino parolas pri speleologo kiel scienca laboristo, kiu okupiĝas per faka studado de grotoj kaj pri solvado de specifaj demandoj de speleologio, aŭ instruita kaj sperta memvola laboristo, kiun intersteritorio estas esplorado kaj malkovrado de grotoj kaj praktika speleologio. Ĝia sinonimo estas **grotisto**.





ESPERANTO KAJ SPELEOLOGIO

Karsto

– estas sinteza termino por landparto konstruita per karbonadaj kaj aliaj solveblaj ŝtonaĵoj kun troviĝo de surteraj kaj subteraj formatoj, karstaj fenomenoj kaj karsta hidrografio. La termino devenas el malnova slovena toponimo „Kras“ indikata teritorion kun specifa ŝtona korodo-erozia reliefo sur kalkŝtonoj de nord-okcidenta parto de Dinara karsto inter Tersta golfo de Adriatika maro, de la Vipava-valo, de Friulplataĵo, de montaroj Ĉiĉarija kaj Brkini kaj de rivero Pivka sur nuna teritorio de sudokcidenta Slovenio kaj norda Italio.



ESPERANTO KAJ SPELEOLOGIO

Groto

– subtera kavo tute aŭ grandparte limigita per patrina mineralo (solvebla, duonsolvebla, nesolvebla) en kiu ekestis per influo de endogenaj kaj ekzogenaj fortoj kaj procezoj aŭ artefarite.





ESPERANTO KAJ SPELEOLOGIO

1. Konataj rilatoj inter S kaj E

El literaturo kaj gazetoj estas konataj nur kelkaj faktoj atestantaj rilatoj inter Esperanto kaj speleologio.

Logike por tiuj rilatoj oni devas havi minimume du kondiĉojn:

karsta lando kun organizitaj speleologoj kaj duaflanke sufiĉe forta E-movado.





ESPERANTO KAJ SPELEOLOGIO

1. 1. En la mondo:

Karel Absolon

Moravia karsto (Brno, 1921)

Julio Mangada-Rosenörn

Santander (Hispana E-asocio, 1933)

Agostino da Silva

La prahistoria arto (portugala Eldona Rondo, 1947)

Marinko Ĝivoje

Pri Postojna (1952),

Kion ni serĉas kaj trovas en grotoj (1953)

Zbigniew Wojcik

Subtera Alpinismo (Pollando, 1957)



Leander Tell (1895 – 1980)

La bela subtera mondo (Juan Regulo, 1959),

Estiĝo de la tero kaj de la homo (1970)



ESPERANTO KAJ SPELEOLOGIO





ESPERANTO KAJ SPELEOLOGIO

1. 2. En Slovakio

Pioniro de speleologio en E-movado en Slovakio estis L'udovít Izák, kiu longjare laboris kiel redaktoro de Esperantisto Slovaka, kie en 1947 publikigis pri la grotoj en Slovakio la artikolon *Vizito en la ŝtoniĝinta mondo*.

En Slovakio estis eldonitaj kelkaj prospektoj pri karsto kaj grotoj:

- La grotoj de centra Slovakio (ĝi enhavas fotografaĵojn kun informoj pri grotoj en Demänová valo - Libereco, Glacia),
- Harmanec,
- Važec,
- Muzeo de slovaka karsto.



ESPERANTO KAJ SPELEOLOGIO

2. Speleologia fakgrupo

- Bazon de speleologoj kreis Esperantistoj el Hungario, Ĉeĥoslovakio kaj Soveta Unio.
- Ideo pri kreo de internacia speleologia fakgrupo naskiĝis en E-klubo en Liptovský Mikuláš, kie kuniĝis kelkaj decidaj faktoroj:
 - longjara Esperanta tradicio,
 - DSG,
 - MSK,
 - SSS.





ESPERANTO KAJ SPELEOLOGIO

2.1. Speleotendaroj

Ĉefa celo de renkontiĝoj de Esperantistoj – speleologoj estis praktika uzado de Esperanto en speleologio. Krei fakan vortaron kune kun ĝia rekta aplikado estas la plej bona metodo. Krom tio estis gravaj ankaŭ praktikaj konoj el unuopaj karstaj regionoj kaj rezultoj el esplorado de grotoj kaj karsto.





ESPERANTO KAJ SPELEOLOGIO

La Unua speleotendaro

- okazis de la 21-a ĝis la 23-a de novembro **1986** en Jánska valo, Malaltaj Tatroj, Ĉeĥoslovakio
- partopenis 9 speleologoj
- laborlokoj estis grotoj Brtkovica kaj Zlomiská
- komencis laboro je speleovortaro





ESPERANTO KAJ SPELEOLOGIO

La Dua speleotendaro

- okazinta dum 23. – 25. 10. **1987**
- en Malaltaj Tatroj (Ĉeĥoslovakio)
- partoprenis krom hejmaj slovakaj kaj ĉeĥaj Esperantistoj – speleologoj ankaŭ hungaraj,
- ekskursoj en grotoj: Mier (Paco), Okno (Fenestro)
- surtera karsto en montmasivo Ohnište
- prelegoj P. Vukov, P. Procházka
- progresis laboroj je speleovortaro





ESPERANTO KAJ SPELEOLOGIO

Fine estis akceptitaj jenaj konkludoj:

- La Esperantistoj – speleologoj disvastigos Esperanton inter speleologoj.
- Ĉiujare okazos „Internacia Speleotendaro“ en alia loko.
- EK L. Mikuláš koordinos laborojn super la faka Esperanta speleologia fakvortaro.
- EK L. Mikuláš estos la centro, kie kolektiĝos adresojn de Esperantistoj – speleologoj.



ESPERANTO KAJ SPELEOLOGIO

La Tria speleotendaro

- okazis de la 20-a ĝis 24-a de oktobro 1988 en montaro Altaj Tatroj, en valo Tichá, parto Červené vrchy (Ruĝaj pintoj).
- partoprenis 14 Esperantistoj-speleologoj, kiuj reprezentis 5 nacioj: bulgaroj, ĉeĥoj, hungaroj, litovoj kaj slovakoj.
- Praktika grotumado konsistis el descendo en abismon Zadný úplaz (profunda 82 m) kaj vizito de la groto Sloboda (Libereco).
- Prelegis J. Vajs, P. Vukov kaj E. Laiconas.
- Decido pri Vesperto, kiel informa bulteno de Internacia speleologia fakgrupo



ESPERANTO KAJ SPELEOLOGIO

La Kvara speleotendaro

- okazis somere de la 20-a ĝis 24-a de aŭgusto **1989** en Ŝimonfa, apud la urbo Kapoŝvar en Hungario.
- 15 partoprenantoj reprezentis kvin naciojn: ĉeĥan, hungaran, latvan, litovan kaj slovakon.
- agadis en la grotoj Csepko kaj Tapolca.
- descendis en abismon Remeny.
- progresis fakvortaro per 21 novaj vortoj kaj difinoj.





ESPERANTO KAJ SPELEOLOGIO

2.2. Agado de E-speleologoj

- aktive partoprenis dum la 10-a Kongreso de Internacia Speleologia Unio (UIS) okazinta 13. – 20. 8. 1989 en Budapeŝto,
- prelegis dum naciaj Esperantaj kaj speleologiaj renkontiĝoj,
- kontribuis al fakaj kaj Esperantaj periodaĵoj,
- efektivigis speleologiajn ekspediciojn.



ESPERANTO KAJ SPELEOLOGIO

Slovakaj esperantistoj – speleologoj
organizis kvin ekspediciojn dum kiuj estis
kunigita Esperanto kaj grotoj:

1989 **RODOPY 89'** (Bulgario)

1990 **KONTAKT 90'** (Aŭstrio kaj Italio)

1991 **MONT BLANC 91'** (Svislando, Francio)

1992 **GIBRALTÁR 92'** (Hispanio, Ĝibraltaro)

1994 **AGUJ 94'** (Mongolio).





ESPERANTO KAJ SPELEOLOGIO

2.3. Vesperto

Ĝi estis oficiala

„Bulteno de la

INTERNACIA SPELEOLOGIA FAKGRUPO“.

La eldonisto estis

Somogy Departamenta Komitato de HEA,

Kaposvár, Hungario.

Kiel redaktoro laboris Petro Vukov

kaj lingva revizianto Dezső Szilágyi.



ESPERANTO KAJ SPELEOLOGIO

2. 4. Membrobazo

Al ĉefaj celoj de formiĝanta faka grupo de speleologoj estis kolektado de adresoj de Esperantistoj speleologoj.

- Fine de 1986 estis konataj nur speleologoj el Ĉeĥio (2), Hungario (1) kaj Slovakio (4).
- Post la Dua speleotendaro fine de 1987 jam estis eldonita unu adresaro, kiu enhavis 16 kopletajn adresojn de speleologoj el 9 landoj.
- Lasta adresaro kolektita al la 28-a de februaro 1990 enhavis 21 adresojn de speleologoj el 12 landoj.



ESPERANTO KAJ SPELEOLOGIO

En la agado de la fakgrupo
partoprenis jenaj Esperantistoj-speleologoj:

Nomo	Lando	Agado
GILPERÉZ, Luis Fraile	Hispanio	SV, KK
HOFEREKOVÁ, Darina	Slovakio	SV
JAUCA, Ciprian	Rumanio	KK
LAICONAS, Erikas	Litovio	KK, ST, SV
LUPTÁK, Andreo	Slovakio	KK, ST, SV
MARKOVA, Katja Kirilova	Bulgario	KK, ST
NOVOTNÝ, Jiří	Ĉeĥio	KK, ST, SV
PROCHÁZKA, Pavel	Slovakio	ST
RYŠÁNEK, Karel	Ĉeĥio	KK, ST, SV
VAJS, Ján	Slovakio	KK, ST, SV
VUKOV, Peter	Hungario	KK, ST, SV

(Klarigoj: KK – korespondaj kontaktoj, ST – partopreno je Speleotendaroj,
SV – kunlaboro super la Speleovortaro)



ESPERANTO KAJ SPELEOLOGIO

3. Speleologia vortaro

- unu el ĉefaj celoj de laboro de speleologia fakgrupo
- rimedo – klasika perpoŝta komunikado
- koordinanto EK L. Mikuláš
- paŝoj:
 - propono de vorto kaj difino
 - konzultoj kun fakuloj neesperantistoj
 - dissendado al la membroj
 - rericevado de prijuĝitaj difinoj
 - korektado de difinoj
 - decido pri fina difino





ESPERANTO KAJ SPELEOLOGIO

abismo

– *unu formo de groto,
kies vertikalaj dimensioj estas esence
pli grandaj ol aliaj dimensioj,*

kalkŝtono

– *sedimenta rokaĵo,
kiu kapablas karstiĝi.
Ĝi konsistas plej parte el kalcia karbonato
(CaCO_3),*

lapiezo

– *tipa formo de surfaca karsto.
Ekestas per efiko de atmosferaj influoj,
per trafluanta kaj trasorbanta akvoj
kun ĉeesto de influo de organismoj
por karstebliga rokaĵo.*





ESPERANTO KAJ SPELEOLOGIO

karsta akvo

– *akvo enhavanta solvitajn karstebajn mineralojn,*

ponoro

– *loko, kie subteriĝas akvo, kie estiĝas subtera,*


karsta fonto

– *loko, kie troviĝas la akvofonto,*

kie elfluas subtera karsta akvo surteren,

sifono

– *loko en groto, kie plafono mergiĝas
sub akvonivelon aŭ sub plenigan materialon
kaj fermas tiel pluan parton de la groto,*





ESPERANTO KAJ SPELEOLOGIO

Kiel fina produkto de la fakgrupo estas verketo de Peter Vukov kaj liaj kunlaborantoj

SPELEOLOGIA BILDVORTARO,


kiu en 1990 eldonis en Kaposvár (Hungario)
E-klubo Gajaj Migrantoj.

Sur 32 paĝoj kaj kovrilo estas 83 speleologiaj
vortoj kun difinoj.

La vortareto estas karakterigita kiel
14 lingva bildvortaro.



ESPERANTO KAJ SPELEOLOGIO



La kajeron redaktis laŭ la interkonsento de la III-a kaj
IV-a speleotendaroj:
dipl.-a inĝ.-o VUKOV Péter - Hungario

Redektara komisiono:	LAICONAS E. Erikas	Litovio
	LUPTAK Andreo	Ĉeĥoslovakio
	NOVOTNY Jiří	"
	RYŠANEK Karel	"
	VAJS Ján	"

Kontrolistoj :	IVANOSIK Gábor	Hungario
	SZILÁGYI Dezső	"

Eldonisto: GAJAJ MIGRANTOJ SOMOGY DEPARTEMENTA ESPERANTO
ASOCIO

H-7400 Kaposvár, Rákóczi tér 7.-8.

Presejo : SOMOGY MEGYEI MŰVELŐDÉSI KÖZPONT

H-7400 Kaposvár, Beloiannisz u.18.

KAPOSVÁR 1990



ESPERANTO KAJ SPELEOLOGIO

4. Diskuto

Konoj el la historio de agado
de spleologia fakgrupo:

- kiamaniere estis kunigitaj du fenomenoj (Esperanto kaj speleologio),
- kiaj kondiĉoj devis esti por bona funkciado,
- kial oni devas daŭrigi en laboro de faka internacia grupo.



ESPERANTO KAJ SPELEOLOGIO

Kunigi Esperanton kun speleologio, aŭ ĝenerale kun iu fako, povas nur homoj, kiuj interesiĝas pri fako, en nia kazo speleologio, kaj kiuj uzas la lingvon. Ili estas portantoj kaj reprezentantoj de praktika uzado de la lingvo en speciala segmento de vortprovizo. Se ni akceptas vortaron, resp. vortprovizon, kiel vivantan organizmon, poste ĝi povas vivi nur per ĉiutaga uzado. Tio signifas ĝia praktikado dum renkontiĝoj, ĝia uzado en eldonaĵoj (fakaj kaj publikaj) kaj en modernaj teknikaj komunikiloj. Same ĝi evoluas kaj ŝanĝiĝas. Iuj vortoj maljuniĝas kaj aliaj novaj naskiĝas.



ESPERANTO KAJ SPELEOLOGIO

Kondiĉoj:

- sufiĉe larĝa membrobazo de fakuloj en naciaj fakaj organizaĵoj, en kiuj funkcias regula komunikado enen kaj ekstere kaj kiuj progresive agadas,
- vivantaj kaj progresagantaj naciaj organizaĵoj de esperantistoj kun komunikaj rilatoj en internacia sfero,
- flua ŝanĝo de generacioj,
- spaco por prezento de laborrezultoj
- kaj ilia akceptado en Esperanto-movado.





ESPERANTO KAJ SPELEOLOGIO

Kion oni devas fari por ĝia revivigo?

Je unua flanko naciaj kaj internaciaj organizaĵoj de speleologoj bone progresas, ili multe agadas kaj estas akceptitaj en homa socio. La speleologiaj organizaĵoj bezonas por siaj internaciaj komunikaj rilatoj universalan lingvon. Nuntempe estas kiel komunaj komunikiloj uzataj angla kaj franca. Bedaŭrinde tio oni ne povas diri pri situo en Esperanto-movado. La membrobazo etiĝas kaj agado flankiĝas al poramuza kaj konsumisma karaktero. Krom tio por la movado estas karakteriza generacia problemoj kaj manko de junuloj.





ESPERANTO KAJ SPELEOLOGIO

La Kvina Speleotendaro okazis
de la 12-a ĝis 14-a de novembro 2010 en Malaltaj Tatroj





ESPERANTO KAJ SPELEOLOGIO



DANKON !